Können Interessante Artikel auf der DEJ-Website hochgeladen werden? Die EA wird immer nach Ablauf des folgenden Kalenderjahres veröffentlicht unter <https://www.esperanto.de/de/ea-archiv>. Unter Umständen können einzelne Artikel schon vorher auf den Seiten der Esperanto-Jugend erscheinen.

6) Wer liest die kune?

Die Zielgruppe sind natürlich die DEJ-Mitglieder.

Des weiteren kann die kune gelesen werden von DEB-Mitgliedern und weiteren Abonnenten der EA ohne Vereinsmitgliedschaft.

Die kune kann auch junge Esperanto-Sprecher*innen interessieren, die nicht Mitglied der DEJ sind. Ob deutsch ihre Muttersprache ist oder nicht, spielt dabei keine Rolle.

Außerdem ist es eine Überlegung wert, ob Esperanto-Familien mit ihren Kindern die Zeitschrift mitgestalten möchten. Ein Kinderrätsel, eine Spieleanleitung oder eine Gute-Nacht-Geschichte sind sicherlich auch für die junggebliebenen unter uns eine tolle Sache!

7) Nächster Termin Montag, 21.09.2020 um 19:30

Thema 7: Organisation eines internationalen Esperanto-Treffens (am Beispiel des JES)
Dieses Protokoll erhebt keinen Anspruch auf Vollständigkeit und wurde nach bestem Wissen und Gewissen erstellt.



Buddenbrooks, Verfall einer Familie

Gehen Sie durch das berühmte Holstentor und treten Sie ein in die edle Hansestadt Lübeck des Jahres 1835!

Spazieren Sie die Straßen entlang und bestaunen Sie die wunderschönen Häuser der einflussreichen Kaufmannsfamilien dieser Stadt!

In diesem Rahmen ereignet sich die Handlung des Romans „Buddenbrooks, Verfall einer Familie“. Der Roman wurde geschrieben von Thomas Mann, der für dieses Meisterwerk 1929 den Literaturnobelpreis verliehen bekam

In dem Roman verfolgt man als Leser mit, wie die anfangs sehr wohlhabende Kaufmannsfamilie Buddenbrook, die eine Getreidefirma besitzt, über mehrere Generationen langsam in den finanziellen Ruin stürzt und all ihr Ansehen verliert. Die Generation, um die sich die Handlung am meisten dreht, weil sie vom Anfang bis zum Ende da ist, sind die Geschwister Antonie Buddenbrook, genannt Tony, und ihre Brüder Thomas und Christian Buddenbrook. Das Unglück über der Familie wird nicht nur durch ihr Schicksal heraufbeschworen, sondern vor allem durch falsche Entscheidungen und Fehlritte ihrer Mitglieder: Thomas Buddenbrook übernimmt sich und spekuliert, Christian Buddenbrook lebt ein Leben in Schulden, und Tony gibt in einem Anflug von Stolz ihren Eltern nach und verspielt damit ein glückliches Leben. Um nur einige Dinge zu nennen, die schief gehen...

Man lernt als Leser die Persönlichkeiten der Familienmitglieder, besonders die der drei eben genannten Geschwister, sehr gut kennen und erlebt mit ihnen die Hoch- und Tiefpunkte ihres Lebens. Die charakterlichen Schwächen, die ihnen am Ende zum Verhängnis werden, empfindet man beim Lesen einfach als menschlich, und auch wenn man mit den Handlungen der Figuren nicht immer einverstanden ist, entwickelt man doch eine Sympathie für sie. Man freut sich mit ihnen, man leidet mit ihnen, aber ebenso kann man sich an manchen Stellen einfach über sie ärgern und sauer auf sie sein. Thomas Mann schafft es, von den Gedanken und Gefühlen seiner Figuren so zu berichten, dass man die komplette Achterbahn an Emotionen mitfahren darf. Der Titel des Romans verrät zwar schon den Ausgang des Romans, den Ruin der Familie. Jedoch führt der Weg zu diesem Ausgang durch viele Kurven, Wendungen und Überraschungen. Erst mit fortgeschrittener Seitenzahl begreifen Leser und Romanfigur, dass die Katastrophe unausweichlich ist. Sprachliche Merkmale des Romans sind zum Beispiel Wörter und Sätze auf französisch und plattdeutsch, die in den Dialogen der Familienmitglieder und ihrer Freunde regelmäßig eingeflochten sind. Anfangs mag es übrigens etwas anstrengend sein, einen Überblick über alle Familienangehörigen und ihre Freunde zu haben; es sind viele Figuren, und auch im Laufe der Handlung heiraten neue Figuren ein, werden geboren oder sterben. Wenn man sich aber kurz Zeit nimmt, um alles zu durchdringen, ist auch das schnell kein Problem mehr. Dieser Roman ist jedem zu empfehlen, der sich erstmals an ein echtes Stück Weltliteratur mit anspruchsvoller Sprache wagen möchte und der sich auf eine Katastrophe ein rührendes Ende wünscht.



Rezension von **Cornelia Luszczyk**

Aliĝilo

Pliaj aliĝdatoj

- Mi estas ordinara membro de Germana Esperanto-Asocio (GEA)
- Atentu:** Se vi loĝas en Germanio kaj NE estas ordinara GEA-membro, vi krompagas 30 €.

Mi partoprenos
 tutepoke
 parttempe de _____ ĝis _____

Mi volas manĝi: vegetare vegane

Mi preferas dulitan unultitan ĉambron*

Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagos 50 € per

IBAN-ĝirado UEA-Konto

ĝis plej malfrue la _____-an de _____ 2020

* mi krompagas 22 € tage

Ni estas optimismaj
 ke LUMINESK' povos
 okazi kiel nun planite.

En la kazo ke ni devos
 nuligi la aranĝon pro
 la kronvirsusa situacio,
 ni repagos la kompletan
 antaŭpagon aŭ
 jam pagitan kotizon.

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
 Esperanto-Laden
 Katzbachstraße 25
 10965 Berlin

Faksilo: +49 30 4193 5413

Kotizo kaj organizantoj

ĝis 2020-08-15	ĝis 2020-10-31	poste*
390 €	425 €	439 €
kotizo		

* necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50 €

La **kotizo** inkluzivas la restadon de la 28-a de decembro 2020 vespere ĝis la 3-a de januaro 2021, matene (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo).

Unultitaj ĉambroj estas haveblaj kontraŭ krompago po 22 eŭroj por nokto.

La **ekursoj** estas pagendaj aparte.

Personoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinara membroj de Germana Esperanto-Asocio, krompagas 30 eŭrojn.

Eblas **partatempa partopreno** je kotizo po 80 eŭroj por nokto (inkl. 3 manĝoj kaj programo). Tiaĝaj gastoj pagas 45 eŭrojn (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Atentu: Ĉi-jare la LUMINESK' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Kiu respondecas pri la renkontiĝo?

Kiel en la pasintaj jaroj la ĉefa respondeculo estas Andreas Diemel el Duisburg. Volonte vi povas alparoli lin ĉiam kaj demandi pri detaloj: demandoj@luminesk.de aŭ per fiksreta telefono +49 203 2964 877 (kun alvokrespondilo).

Organiza teamo

Andreas Diemel (ĉeforganizanto)
 Barbara Brandenburg (oficejo)
 Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujo)

Pago

Aliĝo validas kun antaŭpago de 50 eŭroj
 al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:
 IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42

(Sparkasse Odenwaldkreis)
 BIC: HELADEF1ERB

■ aŭ per UEA-Konto geaa-n.

Pagelo: Luminesk' 2020 Münster + via nomo
 Bonvolu ĝiri la restusumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.



La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio


28-12-2020 – 03-01-2021 Münster/Germanio

Sanĝo de la urbo: Münster

Por LUMINESK' 2020/2021 ni unue elektis la junulargastejon de Bielefeld en Vestfaliao. Antaŭ kelkaj semajnoj la domo nuligis la kontrakton, ĉar la distrikta administrado luis la tutan domon dum monatoj por tie oferti hejmon por de la kronvirsuso traktitaj refuĝintoj.

Ni do estis devigitaj trovi alian domon.

Aasee




Bildo de KarinKarin sur Pixabay

© Deutscher Esperanto-Bund e.V. 2020

Kio estas LUMINESK'?

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj „Internaciaj Festivaloj“ private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7 ĝis 8 landoj.



Ĉiuj fotoj © Jugendgästehaus Aasee

Kie estas tiu renkontiĝo?

En la historiograva urbo de la tielnomata „vestfalia paco“ la tridekjara milito estis finita en la jaro 1648. Tiutempe la riĉaj komercaj familioj influis la bildon de la urbo, hodiaŭ ankoraŭ videbla per la multaj pompaj domoj ĉirkaŭ la merkata placo Prinzpalmarkt. En la nuna jarcento Münster estas konata pro sia universitato kaj la universitata hospitalo. La miloj da studentoj pozitive influas la urbocentron. Münster (poŝtkodo 48151) estas atingebla per aŭtoŝoseo kaj pli favore per la IC de Kolonjo aŭ Hamburgo. Ĝi situas en bela pejzaĝo de la ebena Münsterland. La arkoiro ĉe la merkato Prinzpalmarkt estas vidinda, same la katedralo. Dom kaj la urbodomo, kie la „vestfalia paco“ estis siglita. La multaj studentoj ankaŭ troviĝas sur la vojo de la urba muro, kiu konektas la diversajn urbopartojn ringforme, kompreneble per biciklo, en loka dialekto „leze“.

La domo

LUMINESK'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Neesejo kaj duŝo situas en la ĉambro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. La malnova junulargastejo situanta sufiĉe apude havas faman historion en la Esperanto-mondo: Tiun studentan domon ĉe Aasee ni malgraŭ antaŭmendo por la IJK en la jaro 1974 ne povis ricevi, ĉar oni ĝin ne ĝustatempe sukcesis finkonstrui. Nur dank al la engaĝiĝo de la organizantoj IJK tamen povis okazi, ili trovis aliajn tranoktlokojn.

Programskemo

tempo / tago	28-12 (lun)	29-12 (mar)	30-12 (mer)	31-12 (ĵaŭ)	01-01 (ven)	02-01 (sab)	03-01 (dim)
07:00 - 09:15				matenmanĝo			
09:15 - 10:45		programbloko 1		programbloko 5		programbloko 10	adiatio
11:00 - 12:30		programbloko 2		programbloko 6		programbloko 11	
12:30 - 13:30		tagmanĝo	tuttaga ekskurso		tagmanĝo		
14:00 - 15:30		programbloko 3		programbloko 7	novjara promeno	duontaga ekskurso	
15:30 - 16:00		kafopauzo		programbloko 8	programbloko 9		
16:00 - 17:30	alveno	programbloko 4		programbloko 9		vespermanĝo	
18:00 - 19:30	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo	silvestra bufedo	vespermanĝo	vespera programo	
20:00 - 21:30	interkona vespero	vespera programo	vespera programo	silvestra balo	vespera programo	gufujo / trinkejo	
poste		gufujo / trinkejo					

Jen mi aliĝas al La 6-a LUMINESK'!

Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso/Strato:

Adreso/Poŝtkodo, Urbo:

Loĝlando:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Retpoŝtadreso:

Telefono fiksa:

Poŝtelefono:

Dato/Subskribo:

Mi volas partopreni kiel taga gastulo (sen tranokto)

Einladung zu einem außerordentlichen REVELO-Tag

Die Mitgliederversammlung 2020 wird auf Ende Januar 2021 verschoben.

S tattedessen sind alle Mitglieder des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes herzlich eingeladen, an einem außerordentlichem REVELO-Tag am Samstag 12.12.2020 ab 11:00 Uhr teilzunehmen.

Die Teilnahme ist sowohl im Internet mithilfe des Videokonferenzprogramms ZOOM als auch bei einem kleinen Treffen in Münster möglich.

Informationen, die genaue Adresse in Münster sowie die entsprechende Wegbeschreibung, die Zugangsdaten für die ZOOM-Teilnahme und einen Programmablauf schicke ich nach Anmeldung bis zum 01.12.2020 zu.

Bisher vorgesehene Programmpunkte:

- ♦ Wiedersehen in 2020: Was ist in diesem Jahr trotz der Corona-Krise passiert.
- ♦ Vorbereitung der Mitgliederversammlung 2021: Kandidatenvorschläge für den REVELO-Vorstand.
- ♦ Ihre und Eure Ideen für Veranstaltungen und Kurse in 2021.

Weitere Vorschläge, Fragen und Anmerkungen bitte an
Petra Dückershoff
Auf der Panne 74 a, 44805 Bochum
petra.dueckershoff@esperanto.de

Retpaĝo *esperanto-bayern.info* havas novan aspekton

La informpaĝo pri Esperanto en Bavario – *esperanto-bayern.info* – havas novan, iom pli modernan aspekton.

Ĉio estas legebla en du lingvoj, tiel povas facile informiĝi kaj esperantistoj kaj interesitaj homoj, kiuj ankoraŭ ne tiom bone komprenas Esperanton.

La paĝo enhavas diversajn informojn, ĝenerale pri Esperanto, pri la lokaj grupoj en Bavario (kun ligiloj al la hejmpaĝoj) kaj helpilojn por lerni Esperanton, kaj en surlokaj kursoj kaj interrete aŭ memstare.



Krome ĝi daŭre enhavas tekstojn, ekzemple tradukojn de la iama Kronaĥa Laborrondo Esperanto.

Se vi havas informojn pri loka grupo en Bavario, kiuj ankoraŭ ne troviĝas sur la retpaĝo (aŭ ŝatus ĝenerale diri ion pri la paĝo), bonvolu uzi la kontaktformularon por sciigi nin!

<http://esperanto-bayern.info>

EBLOGO - Esperantotage

Der Esperanto Blindenverband Deutschlands (EBLOGO) lädt vom Freitag 05.02.2021 bis Dienstag 09.02.2021 zu 4 Esperantotagen in das „Aura Hotel Saulgrub“, nahe Unterammergau ein.

Die Veranstaltung ist für alle, die die logisch aufgebaute Plansprache Esperanto sprechen, erlernen oder kennenlernen wollen. Die Brückensprache Esperanto eignet sich gut für ein aktives Gedächtnistraining und ist gelebte Völkerverständigung. Vormittags findet interaktiver Unterricht und ab nachmittags Exkursionen sowie kulturelles Programm statt. Nähere Informationen bei Werner Groen, mobil 0151 54 82 69 07 oder per Mail: WernerGroen@t-online.de

Esperanto lern – wo und wie?

In Kursen vor Ort:
Vierteljährlich Kurse im Grünen Haus, Realschulstr. 12, 2020: 21-23.8., 11.-13.9., 13.-15.11.
Infos und Anmeldung: Esperanto-Gruppe Duisburg
christine.duisburg@gmx.de, Tel.: 01575 803 81 15

Eine gute Übersicht, was Esperanto ist und warum Menschen heute Esperanto lernen, bietet der Film „Esperanto estas...“ (Esperanto ist...) (Suche bei Youtube.)

lernu!
Lernu.net: Kurse, Grammatik, Musik, Filme: <http://lernu.net/de> (App: lernu)

„Esperanto in 12 Tagen“
Der schnellste Kurs für die Grundlagen vermittelt die 500 wichtigsten Wörter.
<http://learn.esperanto.com/de>, (App: Esperanto in 12 Tagen)

Lehrbuch „Tesi, la testudo“
Info: <http://tesitestudo.de>
erhältlich in Duisburg
christine.duisburg@gmx.de

Kurso de Esperanto aus Brasilien, mit Mentorenprogramm: <http://www.kurso.com.br/index.php?de>

Lingolia: Interessante Einführung ins Esperanto mit Quiz: <https://esperanto.lingolia.com/de>

Musik und Podcasts:
Muzaiko: <http://muzaiko.info>
Kern.punkto: <https://kern.punkto.info>
(App: Esperanto-radio Muzaiko)

Reisekalender:
INTERNACIA KALENDARO
<http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Septembra kunsido de la GEA-estraro

La 5-an de septembro kunvenis la GEA-estraro en la oficejo en Berlino. Ne ĉiuj estraranoj povis fizike partopreni: la aliaj ĉeestis virtuale per video-ligo.

Nian kutiman kunsidon en marto ni jam estis devintaj nuligi pro la koronavirusaj limigoj. La planita kongreso en majo ne povis okazi. Intertempe la estraro tamen restis en kontakto per regulaj telefonkonferencoj.

La limigoj pro la korona viruso forte influis la laboron de la asocio. Esperantistoj ĝenerale estas komunikemaj kaj vojaĝemaj homoj, kaj unu tasko de Esperanto-asocioj estas krei la medion, en kiu ni povas komuniki kaj renkontiĝi. Du gravajn eventojn ni ĉijare jam devis nuligi: la paskan renkontiĝon PSI kaj la komunan kongreson kun poloj kaj fervojistoj. Ĉar renkontiĝoj kutime estu enspezigaj por la asocio (en la pasintaj jaroj tio bone sukcesis), nun tiuj enspezoj mankas. Feliĉe la respektivaj elspezoj ĝis nun estis malaltaj: iom da kostoj por informado kaj preparlaboro. Krome nia singarda trezoristo kutime buĝetigas renkontiĝojn kun finance neŭtrala rezulto. Je la fino de la jaro ni tamen ĉifoje devos kalkuli pri ioma defcito. Tio ilustras la neceson ŝpare mastrumi kaj havi rezervon por malfacilaj jaroj kiel la nuna.

Aparta diskuto dum la kunsido pritraktis la subvencion, kiun GEA ricevas el la Erasmus+ -programo de EU por subteni partoprenon en klerigaj eventoj eksterlande. Pro nuligo ankaŭ de tiuj eventoj GEA ĝis nun ne povis plene eluzi la ricevatajn monrimedojn (antaŭpago de 80 % jam alvenis en 2019). Por eviti repagon ni klopodos plilongigi la daŭron de la nuna subvenciperiodo ĝis la venonta jaro. Kaj ni certe ne estas la sola asocio en tiu situacio.

Alia grava temo estis la "virtualigo" de nia laboro. Multaj sekvis la MondaFest' kaj la Virtualan Kongreson organizitajn de UEA: giganta fortostreĉo kun la ŝanco atingi ankaŭ mondopartojn, kies loĝantoj kutime ne povas partopreni en la kongresoj. Je pli malgranda skalo similajn spertojn faras ankaŭ kelkaj el niaj lokaj grupoj (kiuj sukcese translokigis siajn programojn en la reton), kaj Germana Esperanto-Junularo komencis serion de retaj seminarioj pri diversaj aspektoj de la movada laboro. Surbaze de tiuj spertoj ni esperas veni al kelkaj konkludoj dum la oktobra kunveno de la asocia konsilantaro kaj la jarĉefkunveno en Osterode (24.10.2020). Ankaŭ ĝin la estraro diskutis. Tute virtualajn jarĉefkunvenojn nia statuto ne antaŭvidas. Por limigita tempo ĝis la 31.12.2021 tiajn kunvenojn ebligus la COVID19-leĝo valida ekde marto, kiu ankaŭ pritraktas la statutajn devojn de asocioj. Por ĉi tiu jaro ni ne uzos



Sur la foto farita antaŭ la GEA-oficejo troviĝas jenaj personoj: Ronald Schindler (organizanto de la kongreso 2021), Barbara Brandenburg, Michaela Stegmaier, Ulrich Brandenburg, Andreas Emmerich, Franz Kruse kaj Andreas Diemel. Virtuale en la kunsido partoprenis la estraranoj Matthias Hecking, Wolfgang Bohr, Nils Brinkmann kaj Oliver Walz.

tiun esceptan permeson. Sed ni klopodos ebligi retan ĉeeston ankaŭ de GEA-membroj, kiuj ne povos mem veni al Osterode.

La unua "normala" renkontiĝo de GEA ĉijare estos la re-enkondukita aŭtuna migrado EMA ĉirkaŭ Hitzacker de la 18-a ĝis la 23-a de oktobro. Por ĝi aliĝis sufiĉe nombro de partoprenantoj. La jarfinan renkontiĝon Luminesk' ni devis translokigi de Bielefeld al Münster. Ni scias ke la intereso estas sufiĉe granda: multaj kutimaj partoprenantoj tamen ankoraŭ hezitas, ĉar ili timas pliajn limigojn aŭ vojaĝmalpermesojn kaj/aŭ loĝas en landoj pli trafitaj de la viruso ol Germanio. La estraro decidis, ke GEA komplete repagos ĉiujn antaŭpagojn, se la renkontiĝo ne povos okazi pro la koronavirusa situacio. Por la PSI en Braunschweig kaj la komuna kongreso dum pentekosto en Frankfurt (Oder) kaj Slubice la preparoj funkcias normale. La estraro ankaŭ diskutis postajn Germanajn Kongresojn: 2022 en Oldenburg kaj 2023 (la 100-a GEK!) laüble en Braunschweig, loko de la unua Germana Esperanto-Kongreso en 1906.

Pliaj temoj estis i.a. administrataj aferoj kiel pli sistema organizado kaj arkivado de retmesaĝoj por pli fortigi la institucian memoron de la asocio kaj eviti, ke ĉiu devu rekomenci kvazaŭ ĉe nulo. Kaj ni pritraktis la informan laboron de la asocio. Ankaŭ ĝi bedaŭrinde iom suferas. Tradiciaj eventoj, en kiuj GEA sin prezentas, estas aŭ jam nuligitaj aŭ minacataj (kiel la Expolingua en novembro). Des pli grava fariĝas la reta sinprezentado. Ideoj estas ĉiam bonvenaj, sed eĉ pli bonvenaj estas aldonaj laborfortoj!

Ulrich Brandenburg

Videokonferencoj – ĉu LA solvo?

Ingrid Brodnig publicis sian vidon pri videokonferencoj en la aŭstra ĵurnalo „Profil“ n-ro 20/2020, inda je konsidero ankaŭ en la Esperanta mondo, kiu ĉi-jare UK-is virtuale. Tial jen ŝia teksto:

Tri kialoj, pro kiuj videokonferencoj (VK) ne povas konkurenci kun surlokaj konversacioj. Akcepteblas, ke en tempoj, kiam necesas eviti samlokecon de la parolantoj, ties elbuŝigoj okazu perrete. Sed ju pli longe multaj el ni laboras hejmofoje, des pli evidentiĝas la limoj de tiu komunikada maniero. Mi vidas tri gravajn mankojn de la VK:

1-e: La perokula kontakto ne plenalvorte funkcias. Se oni surloke diskutas kun pluraj homoj, tuj oni rekonas, kiu direktas siajn okulojn al la parolanto. Tio apenaŭ atingeblas en VK, oni ne scias la momentan rigardodirekton de la

diskutanto. Parto de la problemo estas, ke la retkamerao ĉe faldkomputiloj muntitas super la ekrano. Oni aŭ rekte rigardas en la kameraon, tiam oni ne trafas la okulojn de la diskutpartnero, aŭ oni alrigardas lin rekte sur la ekrano, sed tiam oni preterrigardas la retkameraon.

2-e: Mankas la korpa lingvo. Nia tridimensia korpo transiĝas kiel dudimensia bildo, kaj tio reduktas la impreson en sia tuteco. Aldoniĝas, ke ni aperas tranĉitaj. Ofte la retkamerao fokusiĝas al la kapo kaj parto de la supra korpo. Tio signifas kaŝi jenan parton de la lingvo, kiun parolas niaj manoj, brakoj, aŭ la tuta korpo.

3-e: Subtileco forfalas. En surlokaj kunsidoj okazas multe da flankaj komunikado. Oni specife gestrigardas al kolegoj, grimacetas laŭnhave, ŝanĝas la korpsintenon. Ekrane tiuj subtilaĵoj ofte ne bone rekoneblas.

Certe VK estas praktikaj – sen ili la kronkrizo estus ankoraŭ pli pena. Tiu teknologia solvo estas do nur proksimuma kompare al surloka interkomunikado. Citante la teknikaŭtoron L. M. Sacasas: 'La problemo kun VK estas, ke nia korpo kaj ĉeestas kaj ankaŭ forestas.'

En la aktuala situacio montriĝas jes ankaŭ la valoro de la homa proksimeco – ke do lingvo ne nur rilatas vortojn, sed inkluzivas ankaŭ nian korpon kiel komunikan instrumenton.

Traduko: Hans Michael Maitzen


UK kaj TEJO- kongresoj 1970

Memoroj meditaj pri la tutmondaj Esperanto-kongresoj antaŭ 50 jaroj en Aŭstrio...

En la jaro 1970, kvaronjarcenton post la Dua Mondmilito, okazis kaj la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en la aŭstra metropolo Vieno kaj la 26-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en Graz, la dua plej granda urbo de Aŭstrio.

Parlamentanoj de Eŭropa Unio veturis per la unua trajno la 19-an de januaro de Vieno al Bruselo. Okaze de la veturo al la unua kunveno de Eŭropa Parlamento en la jaro 2020 ili estis konvinkitaj de la medikonvena kaj komforta vojaĝo tra la nokto. Iom pli longe daŭras la veturo de Verona en norda Italio, tra Aŭstrio.

Jam la trian fojon lastjarcente okazis UK en Aŭstrio post 1924 kaj 1936. Elstara eco de la 55-a UK estis la inaŭgura parolado de la aŭstria prezidento, aktiva esperantisto en la intermilita laborista movado, d-ro Franz Jonas en la Viena Stadthalle (urba halo) la 2-an de aŭgusto, ĉeeste de 2000 personoj, komplete en Esperanto! La foto montras s-anon Jonas, kiam li estis bonvenigata de d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) per transdono de florbukedo de 4 geknaboj. Tiu elstara sceno aperis ankaŭ sur la frontpaĝo de la revuo „Esperanto“ de septembro 1970, en kiu aperis la ampleksa raporto pri la programo, realigita en la UK. La teamestro de la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno mag. Bernhard Tuider afable disponigis al mi kopie tiun numeron por verki ĉi-raporton. Mi partoprenis en Vieno laŭ la kongresa



Marso kaj Esperanto

Difficile est satyram non scribere. (Aŭtoro: Decimus Junius Juvenalis, romia poeto de la unua kaj dua jarcento AD.)


La jaro 2019 estis la granda memorokazo pri la unua surpaŝiĝo al la Luno (50-jara jubileo en julio). La nuna jaro 2020, regata de la tutmonda pandemio, tamen havas denove gravan kosmospacan aspekton. Temas pri ekspedicioj prepare al konkero de la planedo Marso, nia najbaro en la sunsistemo. Ĝuste precize 12 monatojn post la Lunjubileo lanĉiĝis tri spacŝipoj (sen kosmonaŭtoj) direkte al Marso. Ili devenas de Ĉinio, Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj (UAE) kaj Usono. La nomoj de la spacprojektoj de UAE kaj de Usono havas surprizan rilaton al la fama Zamenhofa poemo *La Vojo* (*Originala Verkaro*/VI/2).

Kial do? La spacŝipo de UAE, lanĉita la 19-an de julio, nomiĝas *Al Amal*, arablingve por *La Espero*.



La usona almarŝa veturilo (startis la 30-an de julio) portas la nomon *Perseverance*, angle por *Daŭremo*.

Kaj nun ni iru al la dua strofo de La Vojo:



„Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.”

La graspresita linio reprezentas la nomojn de la Marsprojektoj de UAE kaj Usono!

La ligo de UAE al paco tiel impresis, ke aperis en Vieno jam la apliko de la akronimo UAE al „Unio de Aktivaj Esperantistoj“ kaj rekone al la pacnomo „Emir-speranto“.....

Hans Michael Maitzen

Pajo dum REF 1985

Okaze de la forpaso de la mondkonata Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio Zlatko "Pajo" Tišljar, la 8-an de septembro 2020, jen foto de la Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF) en julio 1985 en Košljun, kroata insulo Pag, tiam jugoslavia, kiun li organizis kun sia kroata familio, invitinte aŭstran familion Maitzen, kune kun pola kaj hungaraj familioj.

Pajo staras dekstre, kvazaŭ dirigento de orkestro, diversvoĉa, kun sube meze la plej juna Stella Maitzen, kiu survoje fariĝis 3-jara. Nun, 35 jarojn pli poste, ŝi reproduktis la koncernan foton far sia paĉjo, por transsendo al Pajo, kiun tiu vidis en la lastaj horoj de sia vivo. Li ripozu en paco.

Hans Michael Maitzen



Mortis Zlatko Tišljar

La 8-an de septembro en la aĝo de 75 jaroj forpasis nia amiko „Pajo“ Tišljar, ĵus elektita Honora Membro de UEA kaj motoro de la Esperanto-movado en multaj funkcioj ekde 1962.



Mi mem unuafoje renkontis lin meze de la 70-aj jaroj, kiam ni ambaŭ aktivis en TEJO. En tiu tempo li organizis la konatajn Pupteatrajn Festivalojn kaj aliajn internaciajn kulturajn eventojn en kaj ĉirkaŭ Zagrebo. Jam tiam impresis min liaj energio, klarvido kaj organiza talento. Li dediĉis sian tutan vivon al laboro por Esperanto, ofte sub malfacilaj kondiĉoj. Aparte menciinda lastatempe estis lia enhava kaj organiza kontribuo al “Multlingva Akcelilo”, projekto uzanta Esperanto-instruadon en bazaj lernejoj kaj subvenciita el EU-rimedo. Post jardekoj mi revidis Pajo-n en 2017 en Freiburg, dum la kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, kies ĝenerala sekretario (kaj senlaca, foje senpacienca motoro, malgraŭ sia grava malsano) li estis ĝis la lasta momento. Mi tiam konatiĝis kun li kiel konvinkita eŭropano. Liaj publikaĵoj pri lingvo kaj eŭropa identeco estas trafaj kaj montras seriozan zorgon.

Pajo ne estas anstataŭebla. Lia morto estas granda perdo por la tuta movado. Por daŭrigi lian laboron necesos pli ol unu persono. Restas nur esprimi niajn sincerajn kondolencojn al lia familio!

Ulrich Brandenburg

Medienecho

Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, sind kursiv gedruckt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

Danke, Hermann

8. September 2020

Eventa Servo

Esperanto-Schnupperkursus in Wien am

16. Januar 2021

<https://eventaservo.org/ef09a90>



6. September 2020

Radio F.R.E.I.

"Esperanto und Erfurt passen gut zusammen: Wir wollen die Vielfalt der Landeshauptstadt der ganzen Welt in der internationalen Sprache präsentieren. Dazu fassen wir interessante Nachrichten der letzten Wochen zusammen und stellen kulturelle Aspekte Erfurts und Thüringens vor. Literaturliebhaber dürfen sich zurücklehnen und Esperantoliteratur (original bzw. übersetzt) genießen. Der Hörerbriefkasten verwöhnt uns mit Neuigkeiten aus der Esperantowelt."

https://www.radio-frei.de/?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1599415200



31. August 2020

3ZZZ-Radio Esperanto

<https://podcasts.apple.com/de/podcast/arkivo-de-3zzz-radio-en-esperanto/id409799836>



29. August 2020

VHS Düsseldorf

VHs Düsseldorf startet wieder

Viele Sprachkurse werden angeboten, u. a. ein Schnupperkursus, ein Anfängerkursus und ein Fortgeschrittenkursus



(November) für Esperanto. Die Kurse werden von Harald Schmitz geleitet.

<https://vhs.duesseldorf.de/vhs/sprachen/weitere-sprachen.html?kathaupt=1&katid=1254&katvaterid=20&katname=Esperanto>

21. August 2020

taz.de

Sprachwissenschaftler über Esperanto:

"Man muss kreativ sein!"

Cyril Robert Brosch, 39, lingvisto el Berlino, parolas nur Esperanton kun siaj filo (9) kaj filino (5). La lingvo estis inventita en 1887 de la okulkuracisto Ludwik Lejzer Zamenhof. Lia celo estis krei facile lerneblan, neŭtralan mondlingvon.

<https://taz.de/Sprachwissenschaftler-ueber-Esperanto/!5708683/>



17. August 2020

herzberg.de

Interkultura Centro Herzberg

Reiches „technisches Neuland“ musste das Esperanto-Centro in der Esperanto-Stadt Herzberg betreten, da wegen der Pandemie aus Sicherheitsgründen „Kontakte vor Ort“ untersagt wurden.

Sehr aktiv nahm Zsafia Korody aus Herzberg, u.a. Vorsitzende des Vereins der Deutschen Esperanto-Lehrer, an der neuartigen Konferenz des Verbandes Internationaler Esperanto-Lehrer (ILEI) teil. Insbesondere die Themen Didaktik und Methodik des Sprachunterrichtes und die langjährige berufliche Erfahrung selbst finden hier in Herzberg eine einzigartige und geschätzte Expertin. <https://www.herzberg.de/portal/meldungen/17-08-2020-interkultura-centro-herzberg--900001068-25580.html>



13. August 2020

Harz-Kurier

Wegen Corona: Esperanto-Centro

betritt technisches Neuland

Peter Zilvar und Zsafia Korody berichten von ihren Erfahrungen mit Online-Kongressen in Corona-Zeiten.

<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article230163002/Wegen-Corona-Esperanto-Centro-betritt-technisches-Neuland.html>



12. August 2020

Neue Westfälische

Nieheimer bei Esperanto-Weltkongress

Corona ist Schuld: Der reale Kongress in Montreal musste ausfallen. Also weichen 2.000 Menschen aus 90 Ländern auf das Internet aus. Mit dabei: Der Nieheimer Konrad Matheus.

Eine Kopie zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2020_08_12_virtuala_kongreso"

Virtuelle Esperanto-Kongresse und Kontakte

Reiches „technisches Neuland“ musste das Esperanto-Centro in der Esperanto-Stadt Herzberg betreten, da wegen der Pandemie aus Sicherheitsgründen „Kontakte vor Ort“ untersagt wurden.

Es tauchten schon im April verschiedene Internetanbieter auf, welche virtuelle Konferenztechniken anboten. Zunächst probierten wir es mit dem bekannten System Skype.

Im Esperanto-Centro wurden schon seit Ende April 2020 statt des allwöchentlichen Dienstagsklubs Kontakte per Internet (u.a. Programm per Zoom) mit Menschen u.a. aus Dänemark, Frankreich, den Niederlanden, Israel, Polen, dem Iran, USA, China, der Türkei, Südamerika, usw. gepflegt. Etliche Menschen interessierten sich für die vielseitigen Aktivitäten per Esperanto in Herzberg. Es war sehr interessant, internationale Freunde (als ob die Fenster des Esperanto-Centros sich öffneten) aus der weiten Welt zu haben. Auch der Sprachunterricht mit praktischen Ratschlägen nutzte den Teilnehmern.

Seit Juli gab es auch eine Vielzahl von sog. Virtuellen Kongressen. So wurde der Internationale Jugendkongress, der in der niederländischen Stadt Someren stattfinden sollte, auch per Internet weltweit erfolgreich absolviert. Jugendliche und Gruppen aus über einhundert Ländern boten Programme zu Themen, wie gesunde Ernährung, vegetarische Küche, Entspannungstechniken, das Erlernen neuer Sprachen, Kultur- und Sprachpolitik, Sketche, Friedenspolitik, Musik, usw. an. Viele große Jugendgruppen, z.B. aus Brasilien, Indonesien, den Philippinen, Russland, den Niederlanden, der Türkei, Litauen, Polen wirkten bei den Präsentationen aktiv mit. Einzelne Sänger und Gruppen aus etlichen Ländern boten Musik verschiedener Genres an.

Als weiterer wichtiger internationaler Kongress fand der SAT-Kongress (eine Vereinigung mit Sitz in Frankreich) auch in virtueller Form statt.

Sehr aktiv nahm Zsófia Kóródy aus Herzberg, u.a. Vorsitzende des Vereins der Deutschen Esperanto-Lehrer, an der neuartigen virtuellen Konferenz des Verbandes Internationaler Esperanto-Lehrer (ILEI) teil. Insbesondere die Themen Didaktik und Methodik des Sprachunterrichts und die langjährige berufliche Erfahrung selbst finden hier in Herzberg eine einzigartige und geschätzte Expertin. Übrigens ist die Herzbergerin Zsófia Kóródy Mitglied des Beirates der weltweiten Vereinigung der Esperanto-Lehrer. Sie konnte den Esperanto-Unterrichtenden aus mehr als 80 Ländern viele praktische Tipps geben und berichtete als Expertin über den langjährigen Esperanto-

Sprachunterricht in verschiedenen Herzberger Schulen.

Einige Kolleginnen und Kollegen wollen nach der Pandemie die Stadt Herzberg und das Esperanto-Zentrum besuchen.

In der ersten August-Woche fand der sog. Esperanto-Weltkongress, der eigentlich in der kanadischen Stadt Montreal stattfinden sollte, ebenso in virtueller Form statt. Das Konferenzprogramm Jitsi wurde hierbei erfolgreich angewendet.

Da alles auch für die Herzberger und die anderen tausenden Teilnehmer aus der weiten Welt neu war, und viele Zeitzonen berücksichtigt werden mussten, kam es nur selten zu technischen Unterbrechungen. Nach einigen Warteminuten oder nach einem Neustart funktionierte es wieder eiwandfrei. So muss man halt mit den neueren Kommunikationstechniken leben.

Es war schön, Esperanto-Sprecher aus fernen Ländern zu hören und zu sehen, die zum Teil nur begrenzten Zugang zu Internet und Strom haben.

Die Leser des HARKKURIERS interessieren sich vielleicht auch, welche Themen für die Teilnehmer aus über neunzig Ländern angeboten wurden. Weit über zweihundert verschiedene Themen bzw. Vorträge standen auf der Tagesordnung, wie Hundefreunde, Katzen als Haustier, Esperanto-Bibliotheken und Museen, Völkerverständigung und Friedensarbeit, Sport, die vegetarische und vegane Lebensweise, Sprach- und Kulturminderheiten, weltweite Originalliteratur, Autorenlesungen, Meditation, das Eisenbahnwesen, Gottesdienste verschiedener Religionen, Umwelt- und Naturschutz, Lesben und Schwule, Radfahren, usw.

Die Vielfalt der Themen in Esperanto wächst und wächst. Es entstehen immer neue Anwendergruppen, wie man sie aus den vielen sog. sozialen Netzwerken teilweise kennt.

Das Herzberger Esperanto-Centro präsentierte insbesondere die Stadt Herzberg und viele Funktionen und Aufgaben des Esperanto-Centros. So wurde die Städtepartnerschaftsarbeit mit der polnischen Partnerstadt Góra erklärt, um die fünfzehnjährige Zusammenarbeit per Esperanto zu erläutern. Viele Teilnehmer aus der weiten Welt fragten nach der großen Bibliothek und den vielen zum Teil einzigartigen Spezialarchiven, die Stadt Herzberg, Sehenswürdigkeiten in der Region, Organisationsarbeiten, sprachliche und kulturelle Weiterbildung, usw. Offensichtlich werden nach der Pandemie Interessenten aus verschiedenen Ländern in die Esperanto-Stadt Herzberg kommen. So haben sich beispielsweise auch eine Künstlerfamilie aus dem fernen Argentinien und ein Sprachwissenschaftler aus Japan für das nächste Jahr angekündigt.

Neben bildlichen Dokumentationen zu den vielen Themenbereichen wurden auch viele Fragen unmittelbar von Zsófia Korody und Peter Zilvar beantwortet. Übrigens ist Zsófia Korody Mitglied des Beirates des Esperanto-Weltverbandes und ist so insgesamt etwas mitverantwortlich. Wir stellten fest, dass bis auf einige technische Blockaden die neuen Kommunikationsmethoden per Internet viele Vorteile bieten. Zum Beispiel entfallen Stress, keine hohen Reisekosten und die Gebühren für virtuelle Kongresse, etc. sind viel niedriger.



Verŝajne nenie en la mondo oni vidas pli multajn publikajn informtabulojn, ŝildetojn, informtekstojn, objektojn ktp. rilate al Esperanto, ol en Herzberg.

Tio estas eksterordinara reklamo por la lingvo Esperanto! En kunlaboro kun la urbo, dank' al senlaca organizado kaj financado far la Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg) kaj kelkaj sponsoroj, ni povis atingi tion je favoro por Esperanto.

Miloj kaj miloj da homoj perceptas, ke Esperanto ekzistas kaj vivas. La ofta kaj konstanta apero de Esperanto havas elradian efikon.

Nun aperis vera surprizo: dank' al DB (Deutsche Bahn), kiu kreis grandajn salut-tabulojn kun teksto sur verda fono "Bonvenon al Herzberg! Oder einfach nur: Herzlich willkommen in der Esperanto-Stadt". Se oni iras al la trairejoj de la stacidomo, ĉe la ŝtuparejoj al la kajoj kaj lifto estas tuj videblaj la grandegaj reklamtekstoj el ambaŭ irdirektoj. Tio certe denove estas unika varbfenomeno en la mondo.

Kelkaj esperantlingvaj gastoj, kiuj veturis al Herzberg per trajno dum la nuna somero, ĝoje rakontis al ni pri tiu "somera surprizo" dank' al DB. Nun ĉiutage centoj da trajnpasaĝeroj vidas la okulfrapajn Esperanto-varbtekstojn.

Krome sur kajo 2 troviĝas plua saluttabulo. Do tiel kreskas la nombro de esperantlingvaj tekstoj ĉe la stacidomo en Herzberg, antaŭ kiu jam de pluraj jaroj ekzistas Esperanto-placo kun pluraj Esperanto-tabuloj kaj memorobjektoj.

Bonvenon kaj ĝoju pri tiu novaĵo.

Interesaj informoj kaj lertaj konkludoj pri Esperanto en lingvoscienco



Mi multe plezurigis pri la ruza objekto de la kontribuo de Lu Wunsch-Rohoven. Por mi ĝi ne nur ekspikas kial la dialogo kun reprezentantoj de lingvistiko rilate Esperanton ofte estis nekontentiga. Aldone la artikolo montras la vojon al produktivaj diskutoj kun singularaj personoj kaj sobraj disputoj kun institucioj de la lingvosciencia sfero. Multan dankon.

Hans Bernd Jerzimeck

Natürlich wollen wir, wenn die Pandemie vorüber sein wird, wieder mehr persönliche Kontakte, auch für Kurse und Weiterbildung uns wünschen und haben. Dennoch wollen wir in Zukunft auf die positiven neuen PC-technischen Errungenschaften nicht verzichten. Es gilt eine ausgewogene Balance zu finden. Die Kontakte in die weitere Welt werden aber durch die vielen Angebote per Internet noch zunehmen. So können auch Sprachstarter die neutrale Brückensprache Esperanto „in der weiten Welt“ alsbald erfolgreich für Ihr Interessensgebiet Freundschaften und persönliche Reisen anwenden. Die Zukunft wird es zeigen. Wenn sich andere Vereine für die neuen Kommunikationstechniken interessieren sollten, können wir gern unsere Erfahrungen mitteilen.

An diesem Wochenende wollen wir auch mit der Herzberger Partnerstadt Góra diese Techniken anwenden. Schon seit Monaten werden die Kontakte der Jugendlichen beider Partnerstädte abgestimmt.

Unikaj varbiloj en la stacidomo de Herzberg



Esperanto por mi

16 esperantistoj, portretitaj de Helga Plötner, de Horizonte (Hori Jasuo, Japanio).

Ricevinte la libron, tuj okulfrapis min la ruĝa-flava kovrilpaĝo kun verda stelo. Sur tiu ĉi kovrilpaĝo estas videblaj la 16 portretitoj en miniatura formato kaj tiel ĝi donas al la legantoj la unuan rigardon en la enhavon kaj scivolemigas ilin.

En mallongaj, tamen informplenaj tekstoj la desegnistino kaj la redaktanto rakontas al la legantoj historieton pri la instigo, kreado kaj evoluo de la ideo por krei tiaspecan libron kaj ĝian longan vojon de la komenco ĝis la preta libro kun artaĵoj, eseetoj kaj fotoj.

Ĉe la unua trafolumado la atenton kaptas la diversstile desegnitaj portretoj. Foje kun fajnaj diferencoj en la linioj faritaj per malmola kraĵono, foje kun molaj, iom pli dikaj linioj faritaj per mola kraĵono aŭ per nigra kreto. La elekto de tiuj du desegnostiloj estas tre trafe farita kaj konvenas al la portretitoj. Tamen ĉiu desegnaĵo havas sian specifajn kaj estas nekomparebla unu kun la alia. Je la dua, pli preciza observado de la desegnaĵoj oni povas nur konjekti, kiom da laboro, peno kaj sindonemo entenas ĉiu bildo. Dum plurfoja longa rigardo ĉiam denove videblas rimarkindaj detaloj en la desegnaĵoj. La konscia ludo kun lumo kaj ombro en la portretoj lasas ekzoni la majstrinon en sia fako.

La kombinado de desegnaĵoj kaj aldonitaj fotoj de la portretitaj famuloj plivigliĝas la paĝojn, la eseojn, kaj donas etoson familian. Per unupaĝaj, kelkaj kortuŝaj sinprezentoj rakontas la portretitoj pri siaj unuaj kontaktoj kun Esperanto kaj pri instigoj lerni, instrui ĝin aŭ eĉ verki librojn Esperantajn. Ĉiuj rakontas ankaŭ pri tio, kiel Esperanto fascinas ilin. Interese



estas ekscii pri la impresa, sindonema agado, laborado, verkado kaj instruado de tiuj 16 eminentaj personoj, eĉ se oni jam konas unu aŭ alian de la portretitoj. Ili rakontas en la eseoj ankaŭ pri si mem, mencias konatajn-nekonatajn, privatajn aferojn, sortojn kaj feliĉigajn eventojn. La libro prezentas al la leganto ne nur aktivajn pensiulojn, sed ankaŭ junajn, engaĝigitajn esperantistojn el diversaj landoj. La eseoj respregulas la tre diversajn agadkampojn de ĉiuj portretitaj esperantistoj, kiuj havas la saman celon: disvastigi Esperanton kaj per tiu laboro provi plibonigi la mondon. La etaj personaj verkoj interese, impone vagadigas la legantojn tra eventoplenaj jardekoj de la komenco de la 20-a jarcento ĝis la nuntempo.

En la antaŭlasta paĝo la leganto ekscias pri la longa, impresa agado de la portretistino por Esperanto. Estas vere menciindaj la vivofazoj kaj sukcesoj per la amata, fascina, magia, mondo-kuniganta, entuziasmigra lingvo de la Majstro L. L. Zamenhof. Lia portreto far Helga Plötner troviĝas sur la dorsa flanko de la libro kun verda skribaĵo: „Danke al via mirinda lingvo ni havas Esperon al nia estonteco.“ La verko evidente montras, kiom multon eblas fari dum la vivo por Esperanto kaj por ĝia progresado. La unuaj kelkaj eseoj instigis min tuj finlegi ĉi tiun impresan desegnaĵ-libron je unu sido.

Estas en plano eldoni duan libron kun portretoj de 16 aliaj aktivaj esperantistoj. Tio denove estos laborego kun geamikoj el multaj landoj laŭ proponlisto de nia tre aktiva, japana amiko HORI Jasuo. La nuna eldono aperis en 300 ekzempleroj kaj la plej multaj jam estas fordonacitaj al la portretitoj kaj geamikoj. Revenis bona eĥo kaj gratuloj el la tuta mondo.

Kiu deziras akiri tiun valoran libron (prezo 5 €), skribu rapide al helga.ploetner@gmx.de, aŭ telefonu al +49 173 7731545. Ĝi estas mendebla ankaŭ per la libroservo de UEA, azianoj povas kontakti ankaŭ horiz-zonto@r.water.sannet.ne.jp.

Ralf Haumer / Helga Plötner

Tra la padoj de la vivo

En la romano “Tra la padoj de la vivo” Julian Modest talente priskribis la luktojn de sola patrino kun filino, la konfrontojn, la proponojn plej diversajn, ofte ne utilajn, eĉ dubindajn.

Ĉu la protagonisto sukcesas ĉiam esti forta virino? Ĉu ŝi ĉiam faras la ĝustajn decidojn? Tiu ĉi romano kunportas vin sur la pado tra ŝia vivo kaj rivelos al vi la respondojn.

“Do, tiuj estas la elementoj kaj la altnivela dialogo subkuŝanta la simplan tekston, verkitan



de Modest, aŭtoro, kiu kaj per rekonstruado de la lilita mito, kaj per dialogo kun la plej grava teksto de la kristana kulturo, rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante alfrontas la defiojn, kaj venki la pruvon de l' tempo, kaj prezenti al la esperantlingva legantaro novan verkon, per kiu li denove montras sin plene kapabla reklami por si plenrajtan seĝon inter la eminentuloj de la Verda Parnaso. Ĉi-sence, oni ja povas aserti, ke (finfine!) Modest reprenas la ĝustan padon kaj batalas la bonan batalon; kaj ĉar pri gardado de la fido ne estas dubo, mankas nur scii, ĉu per novaj verkoj li finos la kuradon.“

El la antaŭparolo de Fernando Pita Rio-de-Janeiro, la 8-an de majo 2020. La libron eldonis la eldonejo “Libera”, Belgio. La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo kaj ĉe la UEA-Libroservo.

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 56 – Buch ja, auf jeden Fall! Aber: lieber auf Papier oder eher elektronisch?

Dieses Thema hatte ich hier eingeplant, doch das soll nun auf einen späteren Zeitpunkt verschoben werden. Statt dessen möchte ich auf einen der positiven Effekte der momentanen Corona-Krise blicken. Im letzten halben Jahr hat das Leben unserer Esperantobewegung nicht nur gelitten, weil die persönlichen Kontakte und Treffen kaum mehr stattfinden durften. Die Treffen haben sich schnell in die virtuelle Welt verlagert, aber es führte auch zu einer Wiederentdeckung der Buchkultur.

Die Menschen fanden so mehr Zeit dafür, mal wieder ein Buch zur Hand zu nehmen; andere wiederum nutzten diese Zeit des Leerlaufs, um gerade in diesem Markt selber produktiv tätig zu werden.

Heinz Erhardt kennt man heute kaum noch. Er verstarb vor über 40 Jahren und war als Komiker der „Willi Winzig“ in der Wirtschaftswunderzeit und ein wahrhaftiges Multitalent: ein Schelm und leiser Literat, auch Pianist mit List. Seine Aufforderung „Sie dürfen nicht alles glauben, was Sie denken!“ kannte ich bislang nur von ihm, und nun lese ich in der Liste der Neuerscheinungen von Petro Chrdle genau diesen Titel: „Ne kredu ĉion, kion vi pensas“.

Es handelt sich um ein populärwissenschaftliches Gemeinschaftswerk von Dr. Valerija Sipos (in der Leitung der Helios Hanseklinik Stralsund) und Prof. Dr. med. Ulrich Schweiger, Facharzt für Psychiatrie, Psychotherapie und psychotherapeutische Medizin sowie Supervisor für Verhaltenstherapie und derzeit im Vorstand des Deutschen Fachverbands für Verhaltenstherapie (ebenfalls in der Leitung der Helios Hanseklinik Stralsund). Der deutsche Titel erschien 2017 im Freiburger Herder-Verlag und ist auch auf Audio-CDs oder in gekürzter Form als Audible-Hörbuch zu haben.

Nun hat sich Alois Eder an die Übersetzung dieses Werks ins Esperanto gewagt, und Petro Chrdle hat es verlegt, so dass man das nun auch in Esperanto zu lesen vermag. Und wir verdanken das der Corona-bedingten Isolation während der letzten Monate, die Alois produktiv zu nutzen wusste.

Über den Inhalt soll hier nur kurz referiert werden; Details können nachgereicht werden, zusammen mit einer Beurteilung der Übersetzung, wenn dessen Lektüre abgeschlossen ist. Kurz also, worum es geht:

Laut Untertitel ist es „Die Anleitung für ein gesundes und glückliches Hirn“, mit neuen Erkenntnissen aus der Hirnforschung und zahlreichen Tipps, Tricks und Fallbeispielen.

Kurzinhalt: Unser Gehirn ist ein Werkzeug, dessen Anwendung Gefahren und Risiken in sich birgt. Wer diese Nebenwirkung nicht beachtet, kann sich unglücklich machen! Dieses informative und fundierte Sachbuch beschreibt kurzweilig, wie man mit dem richtigen Wissen über die Risiken und Nebenwirkungen des Gehirns gezielt seine psychische Gesundheit fördern kann.

Im Verlauf von 24 Stunden hat man bestimmt mehrere Tausend Gedanken, von denen die meisten wieder verschwinden, ohne dass man sich an sie erinnern könnte. Manche sind quälend, manche geben Anlass zur Hoffnung oder erfreuen uns. Aber: wenn wir glauben, diese Gedanken machten uns als Person aus, dann liegen wir damit definitiv falsch.

Das, was da denkt, unser Gehirn, arbeitet nicht ausschließlich in unserem persönlichen Interesse; *mein Gehirn ist nicht mein Freund!* Es ist auch nicht ausschließlich nur mein Feind, sondern es ist ein Werkzeug, dessen Anwendung Gefahren und Risiken in sich birgt. Und genau diese Nebenwirkungen gilt es zu beachten, damit man sich nicht unglücklich macht.

Ganz kurzweilig beschreiben die Autoren, wie man gezielt die eigene psychische Gesundheit fördert, indem man eben dieses Wissen über Risiken und Nebenwirkungen des Gehirns nutzt. In ihrem Buch geben sie konkrete Anleitungen, basierend auf neuesten Erkenntnissen in Hirnforschung und klinischer Psychologie.

In einer Kurzrezension zur deutschen Ausgabe liest man, das Buch stelle viele Denkmuster, emotionale Reaktionen und feste Überzeugungen als Teil der evolutionären Entwicklung und damit als vorgegebenen Bestandteil des Gehirns dar. Diese vorgegebenen Denkschemata seien aber immer wieder kritisch zu hinterfragen, um nicht in Denkfallen (*die Nebenwirkungen des Gehirns*) zu tappen, welche uns krank und/oder unglücklich machen können.

Schön ist, dass die Autoren durch sehr viele konkrete, persönliche und anschauliche Beispiele jede denkbare Gedankenfalle illustrieren; darüber hinaus zeigen sie auch gut nachvollziehbare Wege auf, wie man aus diesen Denkfallen herausfindet. Kritisiert wird allerdings ein fehlendes Glossar, das dem Laien Orientierung böte in der Flut an Fachausdrücken, denen er da begegnet.



Ich bin jedenfalls schon gespannt darauf, wie das die Übersetzung Alois Eders rüber bringt in ein leichtes und verständliches Esperanto. Einen ersten Eindruck gibt der Werbetext auf Petro Chrdles Netzseite <https://www.kava-pech.cz/index.html#/eo/b/Xu0WIRIAACMA2DkP/ne-kreducion-kion-vi-pensas-instrukcio-por-sana-kaj-felica-cerbo>: „La cerbo estas la plej granda mirindaĵo, kiun la homa korpo povas prezenti. Ĝi estas ekstreme utila ilo. Sed se vi tro naivkrede uzas ĝin, ekestas danĝeroj kaj riskoj. La informriĉa kaj profunda faklibro priskribas en distra stilo, kiamaniere per ĝusta kompreno de la riskoj kaj kromefikoj de la cerbo vi povas efike apogi vian psikan sanon. La aŭtoroj estas delonge praktikantaj fakuloj kaj konatigas vin kun konkretaj instrukcioj, kiuj baziĝas sur la plej novaj rezultoj de la cerboesploro, psikiatrio kaj klinika psikoterapio.“

Ich denke, um das herauszufinden, ob und wie die Übersetzung gelungen ist, kann man durchaus die 18€ investieren, zumal dieser Kauf auch einem der wichtigen Esperantoverlage gut tun wird! Ich empfehle den Lesern, neugierig zu sein und zuzugreifen; die Chancen stehen gut, dass sich jeder damit selbst einen Gefallen tun wird.

Ohne einem endgültigem Urteil vorzugreifen: ich finde es eine sehr gute Idee, die Nebenwirkungen der Corona-Zeit so auf eine sinnvolle Weise zu umschiffen, auch wenn diese Einschränkungen einem aktiven Ruheständler weniger Probleme bereiten dürften als einem freischaffenden Puppenspieler und Zauberkünstler, der davon lebt, mit seinem Publikum zu interagieren.

Damit ist (hoffentlich elegant) übergeleitet zu einem weiteren Esperantofreund, der Auswege aus einer solchen Misere suchen musste und glücklicherweise auch fand: soweit ich zurückdenken kann, ist für mich eine Stuttgarter Zamenhof-Feier (meist im Fuchsrain) undenkbar ohne eine Puppenspiel-Vorstellung von Christoph Frank.



Doch beginnen wir von Anfang an! Außer den Esperantofreunden im Süden kennt vielleicht nicht jeder Christoph Frank und seine Zauberbühne, ein 1983 entstandenes Zauber- und Puppentheater. Immerhin sind das nun schon stolze 37 Jahre, zu denen wir Christoph da von ganzem Herzen gratulieren dürfen!

Der gelernte Heilerzieher arbeitet heute freischaffend als Künstler und ist Mitglied im VDP (Verband Deutsche Puppentheater), im MZvD (Magischer Zirkel Deutschland) sowie im Sektor Kunst der AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino).

Um ihn und seine Arbeit näher kennenzulernen, empfiehlt sich <http://www.zauberbuehne.de/> zu besuchen. Als kreativer Mensch gestaltet Christoph seine Figuren selber. Sie helfen

ihm dabei, spannend zu erzählen, etwa vom Wald, der ja immer auch etwas Geheimnisvolles sein kann, vor allem für Kinder, aber auch für Erwachsene.



Doch in der Corona-Zeit durfte er sehr lange nicht auftreten und musste allein mit seiner Fantasie leben. Die aber konnte keine Pandemie bremsen, im Gegenteil: in Christophs Garten wächst ein Haselstrauch, und in dem verstecken sich allerlei fabelhafte Wesen. Doch Christoph entdeckt sie. So kommen beim Schneiden des Haselstrauchs nach und nach an die 40 Figuren zum Vorschein, denen er durch Modellieren mit Kleister und Sägemehl Ausdruck und Individualität verleiht.

Dieser Haselstrauch erweist sich schließlich als Fundgrube: ein wahrer Haselschatz! So kommt Christoph nicht umhin, den Figuren auch Geschichten zu schenken. Es entsteht ein erstes Büchlein *Der Haselschatz* für Kinder ab 3 Jahren, das vom Herrn Giftpilz und seinem Abenteuer mit der Schlange Hilda



erzählt, natürlich nicht nur auf Deutsch, sondern auch in einer eigenen Ausgabe auf Esperanto.

Statt eines Vorworts finden wir diese Reime:

Mia mirinda avelujo

Troviĝas kaŝite en mia ĝardeno
avela arbusto sur fabla tereno.

Aŭdiĝas, dum flustras la vento,
murmuro en kelka momento.

Fojfoje, mi tute sinceras,
vizaĝoj subite aperas.

Jen vorta kaj bildita priskribo
de la avelarbusta tribo.


Es ist in der Tat so: wenn Christoph nicht zu den Kindern kommen darf, dann schickt er ihnen eben seine zauberhaften Fabelwesen, in Form eines Büchleins zum Anschauen – und zum Vorlesen! Genial finde ich, dass durch die Wahl unterschiedlicher Schriftgrößen gleich eine Regie-Anweisung für die Vorleser dabei ist (die Größe zeigt jeweils an, wie laut oder leise man vortragen sollte).

Viel gäbe es noch zu berichten über die mannigfachen Angebote, die Christoph für interessierte Gruppen und Kinder bereit hält, doch es gilt hier, ein wenig mit dem Platz zu geizen, damit auch andere Themen zu Wort kommen können. So soll nochmals auf die Netzseiten verwiesen werden, die das ausführlich dokumentieren: <http://www.zauberbuehne.de/>.

Für Besucher in der Region Rottweil will ich aber gesondert hinweisen auf die Angebote einer historischen Stadtführung und zum thyssenkrupp-Test-Turm, worüber schon Heft 262 (S.31) berichtet hatte.

Zum guten Schluss hier noch ein paar technische Angaben, damit man diese Büchlein auch besorgen kann:

Im Rottweiler Neckartal-Verlag (gleichzeitig auch Buchhandlung Klein) mit 150-jähriger Firmentradition erschienen bislang 3 deutsche und 3 Esperanto-Büchlein zu je 4,50€ im Format Rottweiler Mini (40 S., 15x15cm). Der Verlag wirbt damit, deutschlandweit kostenfrei zu liefern (<https://www.buch-klein.de/lieferung-und-zahlung>).



Die jeweiligen Esperanto-Ausgaben hat Wolfram Diestel durchgesehen (dafür kenne ich leider keine ISBN):

- (1a) Der Haselschatz, ISBN 9952226000184,
- (1b) in E: La aveluja trezoro.
- (2a) Die Haselfüße, ISBN 9952226000191,
- (2b) in E: La flugantaj aveloj.
- (3a) Der Haseljanus, ISBN 9952226000207,
- (3b) in E: La aveljano.

Zu guter Letzt noch ein kurzer Blick auf die Inhalte!

Der Haselstrauch in Christophs Garten scheint das ideale Versteck für allerlei fabelhafte Wesen. Eine erste Haselgeschichte berichtet von Herrn Giftpilz und seinem Abenteurer mit der Schlange Hilda.

Wenn sich Kuni und Bert erhalten, ist das in der Regel kein Problem. Nicht so in der zweiten Geschichte; es zieht ein Sturm auf, und Kuni versteht nur „Bahnhof“. Und was passiert da eigentlich hinter den beiden? Das

Bilderbuch verwebt, bei nahezu gleichen Bilderabfolgen, aber Veränderung in der Fokussierung, zwei verschiedene Geschichten miteinander, die dennoch zusammen gehören.

In der dritten Geschichte begegnen wir Remo und Omer; sie sind neugierig. Sie haben von einem Januskopf gehört und machen sich auf die Suche, um ihn zu finden! Dabei stoßen sie auf das Wesen mit zwei Köpfen, die in entgegengesetzte Richtungen blicken und je einen eigenen Namen haben: Omada und Adamo haben verschiedene Sichtweisen und trotzdem können sie etwas Gemeinsames finden. Dazu müssen sie nur ihren Blick neu ausrichten.

Von den vermittelten Inhalten her gefiel mir diese Geschichte am besten, wiewohl ja jede ihre eigenen Vorzüge hat. Vielleicht ist es nicht jedem aufgefallen: die Namen der Fabelwesen sind Palindrome; liest man den Namen des einen von rückwärts her, so ergibt sich der Name des jeweils anderen. Janus war ja einer der ältesten römischen Götter und stand für Anfang und Ende. So steht der Januskopf für Gegensätze wie zum Beispiel Anfang und Ende, Zukunft und Vergangenheit oder links und rechts.

Um ein abschließendes Urteil abzugeben, formuliere ich nicht „was anderes kann man von einem Künstler erwarten?“, sondern unterstreiche einfach, dass **mich** dieses **Gesamtkunstwerk** wirklich positiv überrascht hat. Mach weiter so, Christoph!

Utho Maier



19-a NR, Novjara Renkontiĝo, okazos ĉi-jarfine de la 27-a de decembro 2020 ĝis la 3-a de januaro 2021, dimanĉo ĝis dimanĉo, denove en Wiesbaden, 40 km okcidente de Frankfurt/Majno, samtempe kaj samloke kun la 12-a NIS, Novjara Internacia Semajno, la programo por junuloj. Alĝo al NIS eblas sur la sama paĝo kiel NR: www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr; www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo. FB-paĝo: www.facebook.com/events/2726848190878416

La unua jardeko de Dokumenta Esperanto-Centro

En junio preskaŭ nerimarkite pasis la deka datreveno de Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio.

Gi situas en la urbeto Đurđevac, 120 kilometrojn nord-oriente de Zagrebo, proksime al la hungara limo. DEC estis fondita en 2010 kiel civitana societo, kaj kiel siajn statutajn celojn ĝi difinis „kolektadon, arkivadon, konservadon, protekton, valorigon, dokumentadon, prilaboron kaj uzadon” de diversaj materialoj en kaj pri Esperanto (libroj, gazetoj, fotoj, dokumentoj, filmoj ktp.). Krome, DEC organizas informan, edukan, kulturen kaj eldonan agadon kaj diversajn Esperanto-aranĝojn ĉefe en la nordaj regionoj de Kroatio, sed ankaŭ tutlande kaj internacie. La laboro de DEC okazas en la lando, kiu pasintjare proklamis „la tradicion de Esperanto” kiel nematerian kulturen valorajon.

Neglektado de la historia heredaĵo kaj perdiĝo de gravaj Esperanto-kolektoj jam delonge ekzistas kiel grava problemo de Esperantujo en ĉiuj niveloj: loka, landa kaj internacia. Ekkreskinte sur la ideoj de Ivo Lapenna, kiu en 1952 ĉe UEA kreis la Centron por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), la kroata Esperanto-arkivo komencis kreiĝi jam antaŭ pli ol kvardek jaroj per konscia kaj sistema kolektado de materialoj, donacataj de esperantistoj kaj iliaj familianoj.

Komence ĝi estis prizorgata en privata domo, sed ĝia amplekso rapide kreskis kaj estis necese urĝe trovi alian lokon. Per mondonacoj de konsciaj esperantistoj, ĉefe de kelkaj eksterlandanoj, en 2017 oni komencis renovigi malnovan agrikulturen domon, kaj jam en septembro 2019, la renovigita domo estis solene inaŭgurita. Krom cento da kroataj esperantistoj, la inaŭguron partoprenis ankaŭ konataj alilandanoj, ekzemple la direktoro de UEA Martin Schäffer, László Szilvási kaj Blazio Wach a el Budapeŝto kaj grupo el la konata Esperanto-muzeo el Svitavy (Ĉeĥio).

Malgraŭ la koronavirusa pandemio, kiu malrapidigis pluajn laborojn, dum la printempo de 2020 plejparto de la arkivaj materialoj estis translokita en la novan domon. La teretaĝo estas kolorigita, kaj en la momento kiam mi skribas ĉi tiun artikolon (fine de aŭgusto), komenciĝis instalado de hejta sistemo, kio ebligos tutjaran intensan uzadon de la domo.

La iniciaton de kroataj esperantistoj preskaŭ ĉiutage subtenas esperantistoj el diversaj landoj. Lastatempe DEC ricevis kelkajn gravajn donacojn, ekzemple la tutan arkivon de la forpasinta kroata esperantisto Dragutin Smolčić el Paderborn, kiun donacis lia filino Maya Gilmbly. Ĉirkaŭ 130 arkivarelaĵojn de esperantistino

Lilli Giloteaux, denaske von Waldowski (germanino, edziniĝinta al franca samideano), DEC ricevis helpe de ŝia filino Nicole Else el Aŭstralio kaj ŝia parenco el Francio. En domo por maljunuloj en Zagrebo estis transprenita la kvara parto de la arkivo de konata kroata Esperanta verkistino Zora Heide, kiu dum multaj jaroj vivis en Danlando, Svedio kaj Islando.

Kvankam la materialoj grandparte estas ordigitaj kaj deponitaj en specialaj senacidaj arkivaj skatoloj, nun sekvas alia fazo de ilia protektado. Jam en 2010 kroata Ministerio pri kulturo konfirmis per sia dokumento, ke specialaj kolektoj, kiel la kolekto de DEC, povas esti ŝtate protektitaj, sed ili devas plenumi certajn kondiĉojn. Unu el ankoraŭ neplenumitaj kondiĉoj estas havigo de specialaj arkivaj ŝrankoj, kiuj protektus la arkivaĵojn kontraŭ nedezirindaj influoj, kiaj estas polvo, humido, fajro kaj ŝteloj. Por aĉeti ilin ni devas kolekti ankoraŭ ĉirkaŭ 6.000 eŭrojn!

Nuntempe ĉe multaj esperantistoj regas la opinio, ke paperaj arkivoj ne estas necesaj, ĉar sufiĉas interreto. Pro tio pluraj grandaj movadaj arkivoj kaj kolektoj, inkluzive la Biblioteko Hodler en Roterdamo, travivas krizon. Kelkaj opinias, ke la prizorgon de Esperantaj kolektoj devus transpreni ne la esperantistoj mem, sed ŝtataj arkivoj en unuopaj landoj. Tio kelkloke okazas, sed en plej multaj landoj tio ne eblas, ĉar ŝtataj arkivoj rifuzas akcepti neordigitan materialon en nenacia lingvo, por kies prizorgo ili havas nek lokon, nek specialistojn. Aliflanke, ni starigu al ni tute

kompreneblan demandon: Kiu havus pli grandan intereson por prizorgi tian materialon: ĉu la ŝtatoj aŭ la esperantistoj mem?

Argumento kontraŭ ŝtata protekto de Esperantaj materialoj estas ankaŭ ilia malofta uzado. La spertoj de DEC tamen estas aliaj! Ĉiujare, ekde ĝia oficiala fondiĝo kaj eĉ pli frue, ni ricevas centojn da petoj por uzi diversajn materialojn. Kelkfoje temas pri simplaj kopioj de artikoloj aŭ fotoj, sed oni ofte interesigas pri tute specifaj kaj ampleksaj temoj. Grandparte la materialon petas ankaŭ neesperantistoj, ĵurnalistoj kaj homoj kiuj verkas artikolojn, diplomlaboraĵojn ktp. Okazadas ankaŭ specialaj laŭcelaj esploroj. Grandan esploron de ni petis ĉinaj esperantistoj pri Tibor Sekelj, kaj nun

okazas esplorado de la vivo de Nikolao Hořňov, kun la celo eldoni monografion pri li.

Jam Ivo Lapenna asertis, ke argumenti por Esperanto ne eblas sen konkretaj dokumentoj kaj aliaj materialoj. En la praktiko la asertoj de Lapenna konfirmiĝis ankaŭ ĉe ni. Pluraj ekspozicioj kaj argumentado ĉe oficialaj instancoj ne eblus sen la riĉa kolekto de DEC. Bona ekzemplo por tio estis kelkaj ekspozicioj en la Urba muzeo de Bjelovar: „110 jaroj de Esperanto en Bjelovar”, ekspozicio de la heredaĵo de Tibor Sekelj, pentrajekspozicioj de pluraj esperantistoj, ekz. Ho Song el Koreujo ktp. La materialo de DEC ebligis ankaŭ eldonon de riĉa monografio pri Esperanto en Bjelovar, kiun financis la Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora.

Nun estas preparata la retejo de DEC (dec-kroatio.hr), kiu ekde la 1-a de januaro 2021 ebligos plian superrigardon de la materialoj de tiu ĉi kolekto. Se ankaŭ vi volas kontribui al plua evoluo de nia kolekto, bonvolu donaci al DEC diversajn materialojn. Niaj





Domo de DEC

biblioteko kaj hemeroteko estas relative grandaj, sed tamen mankas multaj eldonaĵoj, ĉefe eldonitaj en malgrandaj kvantoj kaj de lokaj kaj regionaj societoj kaj kluboj. Ni konstante pliriĉigas ankaŭ nian foto-kolekton kaj dosierojn pri diversaj temoj, ĉefe pri personoj kaj eventoj. Ofte esperantistoj opinias, ke por la historio plej gravas niaj libroj, sed tute malprave oni neglektas la grandegan valoron de originalaj paperaj dokumentoj: protokoloj, kontraktoj, leteroj...

Unu el la plej urĝaj taskoj estas kolekti monon por plene ekipi nian domon. Ĉefe por aĉeti la jam menciitajn arkivajn ŝrankojn, sed ankaŭ por aranĝi tranoktejon por niaj gastoj, esplorantoj kaj vojaĝantaj esperantistoj en nia nova domo, ĉar DEC intencas esti ne nur deponejo por niaj paperaĵoj, sed loko kie okazados diversaj kulturaj aranĝoj kaj renkontiĝoj.

En septembro pasintjare sur la domo ni pendigis provizoran tabulon kun nomoj de personoj, kiuj plej multe finance subtenis nin. Al tiu listo povas aliĝi ankaŭ vi! Septembre 2021 la provizoran tabulon ni anstataŭigos per marmora tabulo kun listo de personoj, donacintaj minimume 250 eŭrojn al nia banka konto: HR072340009111000952 (Privredna banka Zagreb).

Trovu entuziasmon por subteni la aktivecojn de DEC, ĉar ili dependas nur de ni, esperantistoj! Vizitu nin kaj informiĝu pri nia laboro ĉe: Dokumenta Esperanto-Centro, Bana Jelačića 138A, HR-48350 Đurđevac, Kroatio, dec.kroatio@gmail.com

Josip Pleadin

La 6-a Esperanto-staĝo en Métabief

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasa regiono en la vilaĝo Métabief, proksime de la svisa landlimo.

Organizis ĝin la klubo de "Esperanto Chalonais", sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier, jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de la tutmonda pandemio Kovim-19 (kronviroza malsano 2019).

Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio *Claj (Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse)*. La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj

kondiĉoj pro la Kronviroso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj Esperanto-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo, situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis E-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajorojn de TAKE pri konstruado.

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo *Fort de Joux*, transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al grotoj de *Vallorbe*, situantaj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo de Orbe el la lago de Joux. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon *Baud* de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj.

Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo *Marcel Petite*. *Fort Saint Antoine* estas malnova militfortikaĵo, transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo *Comté*. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plurkilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la "Domo de la rezervejo" sur areo je 500 m² estas instalitaj interagaj ekspozicioj, dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lagoj de *Remoray* kaj de *Saint-Point*, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvedejo en alteco de 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En Métabief ni vizitis la fromaĝejon de *Mont d'Or*, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĵaŭde ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj "Merci". Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ Nigra Maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigaut. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj Esperanto-renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso. **Liba Gabalda**



METABIEF 23-29.8.2020

